

Leterkesto, 4-a parto
Claude Gacond, 197-a radioprelego, 1967.07.19 & 1967.07.22

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni daŭrigas nian babiladon kun niaj geaŭdantoj ĉerpante el nia leterujo. La plej malnova esperanto-grupo en la mondo troviĝas en Nürnberg, Germanio. Vi scias tion, se vi atente sekvis niajn elsendojn aŭ legis libron pri nia historio. Anoj de tiu grupo en Nürnberg regule aŭskultas niajn elsendojn. Poŝtkarto kun deko da subskriboj tion anoncis al ni.

A.- Gesinjoroj Alice kaj Walter Peake en York, Britio, ankaŭ estas fidelaj aŭdantoj.

Cl.- En Jugoslavio ni havas aŭdantojn, kiuj skribas interesajn mesaĝojn kaj petas nian programon, sed forgesas aldoni sian adreson kaj subskribas tiom nelegeble, ke vere ne estas eble al ni respondi al tiuj petantoj.

A.- Unu el ili skribas interalie: *“Mi esperas, ke baldaŭ anonciĝos tiom da aŭskultantoj, ke la nuna tempo-daŭro ne plu sufiĉos, ke ni povos aŭdi kantojn, deklamon, fragmentojn el la literaturo.”*

Cl.- Tiam ni devos elekti inter nia pedagogia profesio kaj la laboro por la radio-elsendoj. Sed estus kun ĝojo, ke mi regule aranĝus tiujn programojn. En nia literaturo sin trovas multaj perloj, kaj en Svislando multaj esperantistaj muzikistoj, kiuj povus plibeligi la elsendojn per kantoj aŭ instrumenta muziko.

A.- Sed tiu revo apartenas ankoraŭ al la estonteco. Ni kaj vi kontentiĝu pri la kelkminutaj ekzistantaj programoj. La svisoj, kiuj ilin regule aŭskultas, ĉiam plendas pro malfacila aŭdebleco. Ili ja loĝas tro proksime de nia elsendejo. Por kontentigi tiujn ĉiam pli multnombrajn plendantojn la Svisa Radio ripetos la prelegojn de doktoro Baur kaj la niajn marde kaj ĵaŭde je la 23-a horo 30 per la telefonia kanalo 5.

Cl.- Do sinjoro Henri Perriard en Chabrey kaj Hans Kästli en Sankt-Margrethen, vi provu tiun eblecon kaj esprimu vian vidpunkton.

A.- Sinjoro Kästli instigas la esperantistojn proponi al la neesperantistaj pac-movadoj interŝanĝon de informado. Ekzemple la gazeto *Svisa Espero* aperigu informojn pri la Civila Helpservo, kaj la gazeto de la Civila Helpservo aperigu informojn per esperanto.

Cl.- Ofte ni proponis tiun kunlaboron. Bedaŭrinde iu devus ĝin entrepreni. Ĉu vi, sinjoro Hans Kästli, kiu estas civilisto kaj esperantisto, ne povus vin proponi por iniciati tiun kunlaboron en Svislando?

A.- Salutas OE3RU.

Cl.- Aŭdu bone : OE3RU.

A.- Estas radioamatoro. Li anoncas, ke en Svislando ekzistas nur unu esperantista radioamatoro. Lia voksigno estas HB9FA0QTH.

Cl.- Li loĝas en Bellinzona.

A.- OE3RU loĝas en A-3812.

Cl.- Vere moderna afero. Do bonan tagon OE3RU en A-3812 !

A.- Kaj nun io serioza. Sinjoro Lucien Giloteaux en Wattrelos, Francio, kiu ŝatas niajn prelegojn kaj tiujn de doktoro Baur, informiĝas por scii, ĉu ili foje aperos libroforme.

Leterkesto, 4-a parto
Claude Gacond, 197-a radioprelego, 1967.07.19 & 1967.07.22

Cl.- Ili nun aperas artikolforme, kaj ni informos pri ilia apero la fidelajn aŭdantojn. Ni jam diris, ke nia prelegaro pri la esperanta historio aperas nun en *Sennaciulo* sub la rubriko *80 jaroj de esperanta vivo*.

A.- Aperos baldaŭ libro titolita *Vivo de Gandhi*. Temas pri prelegaro de Edmond Privat, nia antaŭulo ĉe la radio. Ni donos al vi informojn pri tiu libro, kiam ĝi aperos ĉe Stafeto.

Cl.- Sinjoro Maurice Merger en Troyes, Francio, kiu interesiĝis pri la festado en Francio de la centa naskiĝjaro de Romain Rolland, ŝatus scii, kio okazis tiurilate en Svislando. Jen informoj, kiujn donis al ni sinjoro Pierre Hirsch, la stariganto de la Centro Edmond Privat en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

A.- La 29-an de januaro 1966, do je la centa naskiĝtago de Romain Rolland, estis inaŭgurita ĝuste en La Chaux-de-Fonds, kaj dank'al la dokumentado, kiu troviĝas en la Centro Edmond Privat, ekspozicio titolita **Romain Rolland inter ni**.

Cl.- Ĉeestis tiun inaŭguron la vidvinoj de Romain Rolland kaj Edmond Privat, la aŭtoritatoj de la urbo kaj de la kantono kaj la ambasadoro de Pollando, la sekretarioj de la ambasadorejoj de Hindio, Francio kaj Sovetio kaj vasta publiko.

A.- Tiu ekspozicio reliefigis la intimecon de la kontaktoj inter Edmond Privat kaj Romain Rolland kaj samtempe raportis pri la rilatoj inter Romain Rolland kaj multaj personecoj de la kantono Neuchâtel.

Cl.- La gazetaro detalege raportis pri tiu manifestacio, kaj larĝa publiko vizitis tiun ekspozicion dum du monatoj.

A.- En diversaj urboj de Svislando okazis prelegoj honore al Romain Rolland. En Zürich ekzemple okazis memorfesta manifestacio la antaŭvesperon de la naskiĝdato de Romain Rolland, do la 28-an de januaro.

Cl.- Eta ekspozicio estis tiam prezentita kaj komentita.

A.- La ekspozicio prezentita en La Chaux-de-Fonds estis petita de la Instituto Gorki pri la monda literaturo en Moskvo kaj en junio 1966 la dokumentoj apartenantaj al la Centro Edmond Privat kaj al la Biblioteko de la Chaux-de-Fonds estis ekspoziciitaj en la ĉef-urbo de Sovetio.

Cl.- Dum la monatoj novembro kaj decembro malfermiĝis en Ĝenevo, urbo kie vivis Romain Rolland, tre grava ekspozicio titolita **Romain Rolland en Svislando**. Ekzistas tre interesa katalogo pri tiu manifestacio, kiu enhavas studojn pri tiu temo kaj estas ankoraŭ aĉetebla en la art- kaj histori-muzeo en Ĝenevo.

A.- Inter la plej interesaj publikaĵoj, kiuj aperis okaze de la jaro Romain Rolland en Svislando, ni menciuj numeron de la revuo *Studo pri leteroj*, en la franca *Etudes de lettres*, eldonita de la universitato en Lausanne. Temas pri la oktobra kajero, kiu estis entute dediĉita al leteroj de Romain Rolland.

Cl.- En la kantono Neuchâtel la revuo *Revue neuchâteloise* en printempo 1966 aperigis artikolojn de Pierre Hirsch pri Romain Rolland kaj la neŭŝateloj.

A.- Kiel vi konstatas, Svislando celebradis la jaron Romain Rolland. Tiu verkisto, kiu longe vivis en Svislando, estas tre ŝatata ĉefe en la franca parto de nia lando. Lia spirito homarana bone akordiĝis kun la spiritostato de multaj romandaj protestantaj intelektuloj, kaj inter ili altrangis Edmond Privat.

Leterkesto, 4-a parto
Claude Gacond, 197-a radioprelego, 1967.07.19 & 1967.07.22

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-